

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : OKTOBRO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

IX^a KONGRESO DE K. E. F.

PROPAGANDAJ GLUMARKOJ

arte desegnitaj, kun belaj alegorioj pri la historia urbo Girona.

Folioj en 10 koloroj
kun 20 malsamaj markoj
Ĉiu folio kostas 0'40 ptojn.

Vin turnu al S-ro F. Hil
Parque Divisionario, n.º 7 - GIRONA

GVIDLIBRO DE GIRONA

VERKITA DE JOSEP MARIA DALMAU

KAJ

ELDONITA DE « GIRONA ESPERO »

OKAZE DE LA

IX^a KONGRESO DE « KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO »

Kun belegaj gravuraĵoj kaj detala arĥeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Ĉiuspecaj sciigoj.

Estos donacata 1 ekzemplero al ĉiu federaciano ĉeestanta la Kongreson.

Pliajn ekzemplerojn aĉetu po 1 peseto.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Nia Kongreso en Girona

MIRIGA estas la sukceso kiun atingis la revivigo de «Kataluna Esperantista Federacio», de antaŭ unu jaro. Tio pruvas la ekzistadon en nia lando de multaj fervoraj samideanoj, ĉiam pretaj oferi sian moralan apogon kaj materialan helpon. Vere nur estis sentata la neceso ke kelkaj sindonemaj batalantoj, plej agemaj kaj plej kuraĝaj, entreprenu la gvidadon de la afero kaj senlace, obstine, konstante laboru por ĝi.

La kvanton da entuziasmo kaj energio kiun postulis la atingitaj rezultatoj oni povos konstati nur en la Girona Kongreso. Ĝia hela sukceso kronos la grandiozan taskon de rekonstruo de la kataluna esperantista organizaĵo.

Sed, post tiu unua jaro de rearanĝo kaj ordigo, estas necese ke ni plifirmigu la bazon de nia Federacio tiamaniere ke ĝi povu batali por Esperanto plej vaste kaj plej efike. Ke tiu ĉi dua epoko estu inda je la antaŭa!

Kaj estu certaj ke la unuan paŝon en tiu direkto ni faros, se ĉiuj senescepte klopodos ĉeesti la IX^{an} Katalunan Kongreson kaj refreŝigas per tio sian esperantan senton. Almenaŭ por danki la laboron de la Organiza Komitato kaj la afablecon de la geesperantistoj el Girona, veturu tien amase, grandare!

Vi ĝuos la senmortan spiriton de antikva urbo, miksitajn kun la viva animo de idealo nova.

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.

P R O G R A M O

SABATO, 15

- 18^a Oficiala alveno de la Kongresanoj.
 Akcepto ĉe la Urbdomo.
 Malferma kunsido de la Kongreso.
 Salutado de la delegitoj.
- 21'30 Inaŭguro de la Propaganda Ekspozicio ĉe la Urbdomo.
- 22^a Koncerto de piano, violono kaj violonĉelo, ludata de la fama «Trio
 Barcelona», ĉe Teatre Principal, dediĉata al la Kongresanoj.

DIMANĈO, 16

- 8^a Solena Diservo kun esperanta prediko en la antikva romarta pre-
 ĝejo de Sant Pere de Galligans. La Schola Cantorum de la Semi-
 nario kantas la Meson de la Virgulino de Núria (Romeu), kaj
 aliajn kantojn en Esperanto. Faros la predikon Pastro F. Viver,
 malnova samideano.
- 9^a Vizito al la Preĝejo kaj Arĥeologia Muzeo de Sant Pere de Galli-
 gans.
- 10^a Labora Kunsido ĉe «Grup Escolar», laŭ jena tagordo:
 Sekretaria raporto.
 Aprobo de la bilanco ĝis 1^a de Oktobro.
 Diskuto de prezentitaj proponoj.
 Eventualaj petoj kaj proponoj, se tempo sufiĉos.
 Elekto de nova Komitato de K. E. F. kaj de venonta Kongresurbo.
- 12^a Solena malkovro de la marmora tabulo ŝanĝanta la nomon de unu
 el la urbaj promenejoj per tiu de D-ro Zamenhof.
- 13^a Festo de la okulvitruloj ĉe «Café Vila» (ŝerca vermuttrinkado)
- 16^a Ferma Kunsido.
- 17^a Festo de la Floraj Ludoj en la Teatro Principal.
- 20^a Oficiala Festeno.
- 22^a Dancado de Sardanoj ĉe Plaça de la Constitució (Cobla Art Gironí).

LUNDO, 17

- 8^a Ekskurso al Empúries kaj La Escala.
- 9^a Ekskurso al Banyoles.
- 19^a Reveno de la ekskursoj kaj adiaŭna kunveno.

Hortabelo de vagonaroj inter Barcelona kaj Girona

Forveturo de Barcelona	}	5'40	—	7'30	—	10'48	—	14'25	—	17'50
Alveturo al Girona		8'52	—	10'28	—	13'50	—	17'41	—	21'11
Forveturo de Girona	}	6'—	—	6'55	—	12'10	—	15'48	—	19'10
Alveturo al Barcelona		9'12	—	10'20	—	15'—	—	18'56	—	22'24

PREZOJ:

Ordinaraj biletoj	2 ^a klaso	12'40	ptoj.	(iro aŭ reveno)
»	»	3 ^a	»	»
Rabatitaj	»	2 ^a	»	»
»	»	3 ^a	»	»
IRO KAJ REVENO-RABATITAJ BILETOJ	2 ^a klaso	16'30	ptoj.	
»	»	3 ^a	»	»

NOTOJ: Rabatitajn biletojn oni liveras ĉiusabate kaj dimanĉe, la aliajn tagojn oni devas pagi laŭ ordinaraj prezoj.

IRO KAJ REVENO-RABATITAJ BILETOJ: Oni ilin liveras ĉiusabate kaj dimanĉe kaj taŭgas por reveni la dimanĉon aŭ eĉ la tutan lundon. Ni rekomendas do, al ĉiuj aĉeti biletojn por IRI KAJ REVENI kiuj povos esti utiligataj eĉ de tiuj kiuj partoprenos la ekskursojn.

Ni varme rekomendas al ĉiuj, bonvolu uzi la **OFICIALAN VAGONARON** forveturontan la sabaton 15^{an} je la 14'25.

Hoteloj

Hotel dels Italians: Taga pensiono, 15 ptoj. Vespermanĝo kaj ĉambro, 10 ptoj.

Hotel del Comerç: Pensiono, 12 ptoj. Vespermanĝo kaj ĉambro, 8 ptoj.

Hotel Peninsular: Pensiono, 12 ptoj. Vespermanĝo kaj ĉambro, 7 ptoj.

Hotel Centre: Pensiono, 10 ptoj. Vespermanĝo kaj ĉambro, 7 ptoj.

Casa Falguera: Loĝado dum la tuta Kongreso, 15 ptoj.

Casa Quima, Vda. Nuell: Loĝado dum la tuta Kongreso, 15 ptoj.

Oficiala Festeno: 12 ptoj.

(Por la Oficiala Festeno estas necese enskribigi antaŭ la 10^a de Oktobro)

Kongresaj sciigoj

FERVOJA RABATILO.—Malgraŭ niaj klopodoj, ne estis eble atingi kiel en la antaŭaj Kongresoj la fervojan rabaton. Tamen, ĉar dum la kongrestaĝoj ekzistas specialaj biletoj, la rabato kiun oni estus atinginta ne estas tre grava. Tial ni ne insistis pri la afero.

GRUPAJ STANDARDOJ.—Ni rekomendas al la Grupoj kunporti sian standardon, ĉar je la alveno en la Kongresurbon tiuj de la lokaj societoj venos saluti ilin kaj oni iros al la Urbdomo en impona esperanta demonstraĉio.

SALUTADO DE DELEGITOJ.—Ĉiuj grupoj sendu rajtigitan delegiton por pli sukcesigi la malferman kunsidon.

KONGRESINSIGNO.—Ni enmetis ĝin en tiu ĉi numero. Oni bonvolu ĝin surporti dum la tuta Kongreso.

GUIDLIBRO DE GIRONA.—Dank' al la malavareco de la Grupo «Ĝerona Espero» estos eldonata bela gvidlibro de la Kongresurbo kun multaj gravuraĵoj kaj detala priskribo de ĝiaj vidindaĵoj, lerte verkita de nia estimata samideano Josep M.^a Dalmau.

La Grupo eldonanto donacos unu ekzempleron al ĉiu federaciano ĉeestanta la Kongreson. Por tio estos necese ke ĉiu prezentu la Kongresan karton, kiun ni sendas al ĉiu federaciano kune kun la nuna numero. Pli da ekzempleroj oni povos aĉeti po 1 peseto.

NOVA STRATO DOKTORO ZAMENHOF.—Pro la kora helpo de la Urbestro de Girona, ni povos ankaŭ en tiu ĉi Kongreso emocie inaŭguri novan straton Zamenhof kaj publike honorigi la memoron de nia amata Majstro.

OFICIALA FESTENO.—Al tiuj dezirantaj ĉeesti nian solenan Festenon ni atentigas ke estas *absolute necese* enskribiĝi antaŭ la 10^a de Oktobro, per la sendado de la ĉi-kune sendata enskribilo. Prezo: 12 ptoj.

EKSKURSOJ.—Ni petas ankaŭ ke oni uzu la senditan enskribilon por anonci sian partoprenon en la ekskursoj ĉu al Empúries kaj La Escala, ĉu al Banyoles.

Prezo de la aŭtomobiloj: Al Empúries kaj La Escala, 10 ptoj. proksimume. Al Banyoles, 4 ptoj. Kompreneble, oni devas aparte kalkuli la koston de la tagmanĝo.

ESPERANTA EKSPOZICIO.—Ni rememorigas ke oni povas ankoraŭ sendi esperantaĵojn por tiu grava Ekspozicio, instalota en granda salono ĉe la urbdomo. Oni plene zorgos pri la ricevita materialo.

GLUMARKOJ DE LA KONGRESO.—Aĉetu la belan kolekton eldonitan de la Organiza Komitato por la kaso de la Kongreso.

Vin turnu pri ĉiaj aferoj al S-ro F. Hil, Parque Divisionario n-ro 7, Girona.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Versaĵo kantanta Amon — Oni aljuĝas la premion al la verko n-ro 72, devizita «Ruĝa Floro». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 56, devizo «Andante». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 64, devizo «Ama malkvieto». *III^a Subpremio* — Al la verko n-ro 39, devizo «Madrigalo». *IV^a Subpremio* — Al la verko n-ro 69, devizo «Nur unufoje amas la kor'». *V^a Subpremio* — Al la verko n-ro 14, devizo «Nubo mistera».
- II. — Ama verko en prozo — Ne aljuĝita.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de «El Misteri de la Prada» — Estas aljuĝita la premio al la verko n-ro 9, kun devizo «Ni amu la pacon de l' Naturo».
- II. — Traduko de «L'escarment» — Premio al la verko n-ro 1, devizo «Secundum scripturas». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 52, devizo «Sweet, sweet, sweet...». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 62, devizo «Ne ŝovu la nazon».

La NATURAN FLORON kaj la rajton elekti Reginon de la Festo, oni aljuĝas al la verko n-ro 72, kun devizo «Ruĝa Floro».

La Premion difinitan por la Originalaj Tekstoj II, la Juĝantaro aljuĝas kiel I^{an} Subpremion de la originalaj Tekstoj I, al la verko n-ro 56, devizo «Andante».

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de Lia Moŝto D-ro Narcís Plá i Deniel : Duonigita inter la verkoj n-ro 18, «Individuo» kaj n-ro 65, «Diada senyalada». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 49, «Ne fari malbonon estas nia devo». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 46, «La Majo alvenis». *III^a Subpremio* — Al la verko n-ro 51, «Aglo blanka». *IV^a Subpremio* — Al la verko n-ro 3, «Ruskinano».
- II. — Premio de la Grupo «Semo» de A. E. P. — Ne aljuĝita.

- III. — Premio de la Grupo «Barcelona Stelo». — Ne aljuĝita. *Subpremio* — Al la verko n-ro 50, «Pripensu...».
- IV. — Premio de la Esperanta Societo «Nova Sento». — Ne aljuĝita. *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 74, «En la mondon venis nova sento». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 48, «Pentekost'».
- V. — Premio de «Unió Deportiva» el Girona — Al la verko n-ro 21, «Sunt qui cuvrículo suo...».
- VI. — Premio de S-ro Casià Costal, Direktoro de la «Normala Lernejo por Instruistoj» el Girona — Al la verko n-ro 41 «Ne tentes ant perfice».
- VII. — Premio de Lia Moŝto Markizo de Camps — Al la verko n-ro 66, «Nunca fuera caballero de damas tan bien servido». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 35, «Quis fuit, horrendos primus qui protulit enses? Quam ferus et vere ferreus ille fruit!»
- VIII. — Premio de la Grupo «Ĝirona Espero». — Al la verko n-ro 76, «La Devesa».
- IX. — Premio de la Societo «Marte» el Girona. — Al la verko n-ro 37, «Nova metodo». *I^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 8 «La falsa aŭ vera puritanismo de la nuna esperanta literaturo malhelpas ĝian beletristikan disvolviĝon». *II^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 60, «En sonĝo patrujon mi vidis».
- X. — Premio de Lia Moŝto Vicari Capitulara de Girona. — Duonigita inter la verko n-ro 13, «Sub la verda stelo ni antaŭen iru» kaj la verko n-ro 17, «Por Dio kaj Eklezio!».
- XI. — Premio de la Moŝta Katedrala Kanonikaro el Girona. — Al la verko n-ro 73, «...Homar', vojirul!».
- XII. — Premio de la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Seminario de Girona. — Al la verko n-ro 27, «Ut omnes unum!».
- XIII. — Premio de «Grupo Escolar» el Girona. — Ne konkursita.
- XIV. — Premio de la «Unión Gremial y Patronal» el Girona. — Ne konkursita.
- XV. — Premio de «Coliseo Imperial» el Girona. — Al la verko n-ro 68, «Sangaj larmoj». *I^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 70 «Amo kreas la pacon». *II^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 54, «Infano».
- XVI. — Premio de «Schola Orpheonica» el Girona. — Al la verko n-ro 24, «Festina lente».
- XVII. — Premio de «Instituto General y Técnico» el Girona. — Al la verko n-ro 53, «Nojo».
- XVIII. — Premio de la Komerca Ĉambro de Girona. — Al la verko n-ro 10 «Magnificat».
- XIX. — Premio de Lia Moŝto la Provincestro de Girona. — Ne konkursita.

IX KONGRESO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Girona 15 - 16 - 17 Oktobro 1921

ENSKRIBIĜO POR LA OFICIALA FESTENO

S - ino el
- ro

mendas lokojn ĉe la Oficiala Festeno, garantiante al la Organiza Konitato la pagon de la menditaj lokoj po 12 ptoj. ĉiu.

POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ AL EMPURIES KAJ LA ESCALA

S - ino mendas lokojn en
- ro

la specialaj aŭtomobiloj pot tiu ĉi ekskurso.

(Prezo de la aŭtomobilo proksimune 10 ptoj.)

AL BANYOLES

S - ino mendas lokojn en
- ro

la specialaj aŭtomobiloj por tiu ĉi ekskurso.

(Prezo de la aŭtomobilo proksimune 4 ptoj.)

(dato) 1921

(subskribo)

NOTO: Bonvolu sendi tiun ĉi enskribilon al S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario, n.º 7 - Girona. - NEPRE antaŭ la 10^a de Oktobro.

*ORloben 1921 sendita per poste 130/131
Kataluna Esperantista*

Girona 15 - 16 - 17 Octubre 1931

ESKRIBIO POR LA OFICIALA FESTENO

2 - inc
- 10
mendas lokojn de la Oficiala Festeno kantona de la Gira-
niza Kantono la pagon de la mendas lokojn po 12 pti. du

POSTKONGRESAJ ESKURSOJ
AL EMPURIS KAJ LA ESCALA

2 - inc
- 10
mendas lokojn en
la speciala) aŭtomobiloj por tri el eskurso
(Prezo de la aŭtomobilo proksimume 10 pti.)

AL BANJOJES

2 - inc
- 10
mendas lokojn en
la speciala) aŭtomobiloj por tri el eskurso
(Prezo de la aŭtomobilo proksimume 4 pti.)

(dato)
(subskribo)
1931

NOTO: Bonvolu sendi lin el eskrifton al Sr-o Francisco M.L. Parrae Divisio-
nada ad T - Girona - NEBRE antaŭ la 10^a de Oktobro.

XX. — Premio de la Ekscelenca Urbeŝtraro de Girona. — Al la verko n-ro 15, «Gloron al nia Majstro!».

La Premion difinitan al la Eksterordinara Temo II, la Juĝantaro, kun konsento de la donacinto, aljuĝas kiel I^{an} Subpremion al la Eksterordinara temo I, al la verko n-ro 49 «Ne fari malbonon estas nia devo».

Laŭ la regulo II de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro kiu zorgos pri ilia publikigo. Permeson por reprodukto oni petu de la Redakcio de *Kataluna Esperantisto*.

Oktobro 1921. — Eduard KÜHNEL, prezidanto. — D-ro Josep CASANOVAS. — Josep GRAU. — Teo JUNG. — Estanislau PELLICER, sekretario.



BILANCO DE LA 10^a DE OKTOBRO 1920 ĜIS LA 1^a DE OKTOBRO 1921

ENSPEZOJ	Pesetoj
Donacoj por Kapitalo de K. E. F.	550'—
» » propagando	50'—
Anoncoj aperintaj sur Kataluna Esperantisto.	188'50
Vendado de poŝvortaretoj kaj katalunaj ŝlosiloj.	358'65
» ponumere de Kataluna Esperantisto	7'—
Kotizaĵoj enspezitaj	1729'50
Ekzamenaj matrikuloj	47'—
	2930'65

ELSPEZOJ	Pesetoj
Deficito de la antaŭa jaro	78'—
Ĝeneralaj presaĵoj	304'—
Presado de 9 numeroj de Kataluna Esperantisto.	1390'—
Aĉetado de poŝvortaretoj kaj eldono de Katalunaj ŝlosiloj	324'80
Ĝeneralaj elspezoj, korespondado, poŝtmarkoj, k. a.	313'85
	2410'65

RESUMO	
Enspezoj	Ptoj. 2930'65
Elspezoj	» 2410'65
Restas en kaso	» 520'—

Barcelona, 1 Oktobro 1921.

La Prezidanto: JOAN GILI NORTA

La Administristo: PERE NAVAS

La Kasisto: JAUME PRUNA

Girona



IRONA, Girona nemortema! Nun estas nokte kaj viaj ruinaĵoj timigas. Malantaŭ la Katedralo estas sabato de sorĉistoj, aliformigitaj en arkitekturaj strukturoj. Estas nigra abismo apud la nuda rando de altega muro. La akutaj steloj vivas tre supre kaj la strigoj tre malsupre. Kaj en la placo solena kaj terura — kie laŭfantoma ŝtuparego konfuzo elvokas en la penso de la vojaĝanto rememoron je stranga revo de antaŭ dudek jaroj — nevideblaj infanoj, kiujn eĉ je iliaj malbonagadoj la urbo genio inspiras, ludas teruran ludon; kaj en la silento de la alta vespero pordfrapilo batas, ĝi sola, la domon de retordita maljunulino.

Sed, jen estas tagiĝo. Kantas la kokoj, kaj la Devesa, apud la rivero, mildiĝas kaj paradiziĝas, kvazaŭ la bosko kie Beatrico montriĝis.

Jes, Girona. Vi aspektas ordarangita de febro el Dante. La muregoj, la Infero. La preĝejoj, la Purgatorio. La arbaroj, la Ĉielo.

Viaj artistoj skribas akrajn rakontojn timigajn aŭ desegnas skeletojn kun ĉapelaĉo duonkovranta la senharaĵon kaj pipo inter la makzeloj.

Sed vi kaŝas en via interno, Girona, la junan aman Arkitekturiston. Tiun kiu havas la animon tiel nova, pulsbatanta, suka kaj plena de estonteco kiel unu el tiuj primitivaj organismoj en la fundo de la maro, kiuj sin movis malkviete ĉar ili gardis, laŭ la zoologoj, en sia patrina gelateno la plasmon de ĉiuj estontaj organismoj, de ĉiuj animaloj kaj plantoj kiuj estas plenigitaj la mondon de varieco.

Girona, vi estas kvazaŭ maljuna militisto invalida kaj eksterbruligita de la fajro el la timegindaj bataloj, kaj en kiu aperas, de tempo al tempo, ĉe la hirta lipharo, hela boneco de infano.


Vi estas, Urbo, malmola nukso, kun ŝelo ŝtona kaj sulka, sed blanka interne, mola, lakta, dolĉega.

EUGENI D'ORS


El kataluna lingvo tradukis
JOSEP MARIA DALMAU

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio


Girona : 15 - 16 - 17 Oktoebro 1921



Vidaĵo kun la Katedralo kaj Preĝejo de Sant Feliu.




St. Pere de Galligans: Pordo.



Malnova rimarkinda strato.




Pentrinda rivero Onyar fluanta tra la urbo.




Urbdomo



Ĝardenoj de «La Devesa»




Placo de la Katedralo.



Sant Pere de Galligans : Klaüstro.



Katedralo: detalo de la klaŭstro.



Preĝejo Sant Feliu : Romana-Kristana sarkofago.

Kanzono



MANĈON matene, sub la varmega suno falanta en la placon de Sarrià, mi vidis maljunulon el tiuj kantante trairantaj la mondon, kiu solene staris kaj kantis meze de rondeto de infanoj lin aŭskultantaj kun malfermita buŝo.

Li kantis per plena voĉo, kun tia fremda akcento elvokanta vizion pri longaj marŝadoj tra nedifinitaj vojoj al malproksimaj horizontoj, trairante kampojn kaj urbojn, solecajn montojn kaj vastajn ebenaĵojn plenajn de dissemitaj vilaĝoj, elportante sunon kaj roson, pluvojn kaj ventojn, ĉiam antaŭen, ĉiam malproksimen, kantante — malarangata la barbo kaj la longa griza hararo libere fluganta — fremdajn kanzonojn per akcento ĉie fremda, kaj ĉie trovante rondeton de geknaboj pretaj ĉirkaŭi lin kaj lin aŭskulti kun buŝo malfermita.

Mi tuj sentis ion moviĝi en mi, kvazaŭ degelo, kaj forlasante malrapide la promenejon mi ekrevis tute dolĉe. — Se mi estus poeto — mi pensis — en la aĝo de dudek jaroj, havanta la amatinon malproksime, mi vokus tiun viron kaj venigus lin sidadi kun mi en iun ajn angulon de kvietata beleco, kaj diktus al li la kanzonon de mia amo; kaj post ol li estus ĝin ellerninta, petante al li ĝian neforgeson, mi montrus al li la punkton de la horizonto en la direkto al la malproksima feliĉa loko.

La maljunulo foriris kantante, kantante mian kanzonon por ĝin ne forgesi, kaj al ĝi tuj aldonus sian akcenton, akordante ĝin al la ĝojo de l' momento pro la denova marŝado kaj mondonaco ricevita.

Kaj antaŭen iradus la kanzono. La sunradioj orumus ĝin kaj la roso donus al ĝi misteran ĉarmon; ĝi fariĝus forta pro la ventoj kaj dolĉa pro la matenaj odoroj; la maljunulo ĝin kantus larmoplena meze de la plej grandaj mizeroj, etendante la manojn al peco da pano; kaj en bentsorta tago li ĝin kantus bakusa ŝanceliĝante post la eliro el vintrinkejo; la morgaŭon matene, dum li marŝus tute sola tra la arbaroj, ĝi estus pura kiel birda frilo; kaj vespere, je lia alveno al la urbo jam tute lumoplena, ĝi tordiĝus volupte. Kaj ĉie oni lernus ĝin, ĉiu siamaniere. Eĉ la maljunulo mem, aŭdante ĝin ĥore rekantata ĉirkaŭe, vidus ĝin transformita, li ĝin ree lernus, malnova ĉiam kaj ĉiam nova.

Kaj ian tagon — ian tagon! — alvenus la maljunulo en belan vilaĝon dum granda festo; ĉiuj troviĝus sur la stratoj, tra la stratoj meze de muzikoj, kaj en la aero estus sonorila bruego. Bela tago, bela suno gajigus tiun matenon. Kaj la viro stariĝus en la mezo de la placo kaj aŭdigus mian amanan kanzonon kiel kanton de festo. Kaj ĝi estus tia, ĉar ĉiu en ĝi sentus la spiradon de l' longa marŝado, la sunon kaj la roson, la postsignojn de ĝojoj kaj mizeroj, la froton de l' popolamasoj: ĉion ĉi kreskigatan de mia kovinta amo.

Kiam li estus fininta, grandaj laŭdoj resonus ĉirkaŭ li kaj multan monon

li kolektus, tre ĝoje donacitan. Kaj meze de la popola bruo li aŭdus klaran kaj delikatan voĉon, dirantan: — Mi ne scias kion enhavas tiu ĉi kanzono, tiele al mi plaĉan. — Kaj li, sin turnante, respondus: — Nur povas esti tio, ke por vi ĝi estis verkata. — Kaj tiam li rakontus al la knabino kiel kaj kie ĝi estis al li instruata.

Tiam ŝi ĝojege respondus: — Diru al li, do, ke mi en la interno de mia koro tiel same parolis. —

Nu, kion plu mi rakontos? Ke tiele finiĝis mia revo. Sed ĝi ne tute finiĝis; ĉar tio okazis dimanĉon kaj alian dimanĉon, kiam mi jam ne rememoris pri tio, mi vekigis en mia lito, matenfrue, ankoraŭ mallume, kaj sur mia soleca strato mi aŭdis pezan kaj malrapidan paŝadon alproksimiĝantan kun kanzono mallaŭte sonanta el la lipoj. Kaj tiu kanto estis al mi tiel dolĉa, ke ĝi ŝajnis kantata en mi mem, kaj havis tian misteran ravon, ke mi ne sciis ĉu mi dormas aŭ ne. La malrapida paŝado kaj la kanto malpeza pasis kaj baldaŭ foriĝis, kaj la strato restis denove kvieta kaj soleca. Ektagiĝis en mia fenestro kaj mi denove dormiĝis; sed la kanzono restis en mia memoro. Kaj iu, al kiu mi ĝin ripetis, diris al mi ĉu ĝi estas popola kanto el Rosselló.

Sed mi kredas ke ĝi estas la revita kanzono de la reva amo juneca, kiu revenis al mi transformita. Kaj mi pensas ke ni ĉiuj vivas, pli ol ni supozas, en misteraj realaĵoj.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis

ROMÁ GUARDIET



Oficiala Parto

La Direkta Komitato de K. E. F., en sia kunsido de la 21^a de Septembro, decidis esprimi publike sian bedaŭron kaj malaprobbon pri kelkaj konceptoj enhavataj en la antaŭparolo al la propono farita de Esperanta Societo «Paco kaj Amo», diskutota en nia venonta IX Kongreso.

LA VIC-SEKRETARIO: JAKO CLARAMUNT

Novaj Profesoroj de Esperanto



SIATEMPE okazis la naŭ paroladoj celantaj altiri la atenton de la estontaj Profesoroj sur tion, kio estas necesa ĉe bona instruanto de nia kara lingvo el diversaj vidpunktoj.

La tri unuaj paroladoj estis pri gramatiko. En ili S-ro Artur Domènech klarigis per interesa maniero la gramatikan strukturon de Esperanto, konstatante la gravan helpon por ĝia lernado devenantan de gramatikaj konoj.

En aliaj tri, S-ro Delfi Dalmau montris kiamaniere Esperanto povas esti instruata, ne tiel gramatike, kaj vidigis tutan planon laŭ kiu oni povas instrui la internacian lingvon, same kiel la naciajn. Saĝaj didaktikaj rimarkoj valorigis ankoraŭ liajn disertaĵojn.

En la tri lastaj paroladoj S-ro Josep Grau pritraktis la esperantan literaturon kaj faris amason da interesaj rimarkoj pri korekta esperanta stilo. Li faris komenton pri la Fundamenta Krestomatio, legante kelkajn el ĝiaj perfektaj prozaĵoj, atente studis la esperantan versfaradon kaj diris trafajn konsilojn pri ĉiuj pecaj literaturaj tradukoj.

La 4^{an} de Septembro okazis la ekzamenoj, ĉeestataj de distingindaj geesperantistoj. Tutan matenon daŭris la skribaj kaj parolaj provoj. Fine la Tribunalo, konsistanta el la tri paroladintoj, sciigis ke estas novaj Profesoroj la jenaj samideanoj: S. Alberich Jofrè, Jaume Claramunt, Antoni Durà, Joan Font Giralt, Jaume Grau Casas, Romà Guardiet, Salvador Gumà kaj Luis Santamarina.

Atingis la diplomojn pri Kapableco: Sinjoroj Josep Alberich kaj Vicens Andrés, kaj Fraŭlinoj Pilar Molins kaj Anjo Vilaró.

La ekzameninto S-ro Grau laste parolis, rekomendante al ĉiuj fervoron kaj persistemon en la instruado de nia lingvo por la bono de la movado.

Kanto: De l' Poeto al Amatino

Kredu min, amatin' ĉarma,
 kaj forigu viajn timojn;
 miajn sincerajn esprimojn
 tute fidu via kor';
 kvankam forte min altiras
 de Natur' la Poezio,
 de mia ama pasio
 por vi estas la fervor'.

Ne bedaŭru mian amon
 je l' Naturaj emocioj,
 ĉar, kvazaŭ viaj graciaj,
 vekas sentojn de l' Poet';
 kaj li gloraĵn similecojn
 en vi trovas, kun plezuro,
 je la ĉarmoj de Naturo,
 de viaj ĉarmoj portret'.

Estas via ruĝa buŝo,
 por mi, kvazaŭ bela floro
 heliĝinta, dum aŭroro,
 pro la kiso de la sun';
 kaj estas viaj okuloj
 tiel helaj kiel lago
 montranta, post luma tago,
 blujajn rebrilojn de lun'.

La bruo de l' foliaro,
 pro la venteta kareso,
 ŝajnas diri pri amjeso
 mallaŭta, kun ĉarma tim';
 kaj mi tiam rememoras
 la dolĉajn, gajajn momentojn,
 dum ni esprimas la sentojn
 de nia amo sen lim'.

Kiam, ĉe fino de tago
 ĉielblua, dum somero,
 min ĉirkaŭas la mistero
 de la glora sunsubir',
 mi kredas ke min influas
 via rigardo magia,
 kies ĝoj' melankolia
 min pretigas al sopir'.

La triloj de la birdaro,
 kiu ĝojege sin movas
 sur la branĉoj, ĉar ĝi trovas
 en ili lokon por nest',
 estas similaj al viaj
 ĝojaj, belsonaj ekkrioj,
 kiam miaj ampasioj
 elmontriĝas sen atest'.

Kaj en tiaj emocioj
 trovas anim' de Poeto
 dolĉan fonton de kvieto,
 dum je vi li restas for;
 ĉio kio lin kortuŝas
 kaj antaŭ li belaspektas,
 el viaj ĉarmoj nur estas
 ĝojiganta rememor'.

.....
 Amu min, amatin' ĉarma,
 kaj la varm' de miaj rimoj
 estu por niaj animoj
 ama kuniga fervor';
 nur apud vi mi deziras
 vin rigardi kun envio,
 ĉar mia ama pasio
 estas mia sola glor'.

JAUME GRAU CASAS

Por la blindaj esperantistoj



ESTON tre ŝatatan ni ĝuis en la sidejo de K. E. F., la 15^{an} de Septembro, okaze de la parolado pri Praha de S-ro Gili Norta kaj la koncerto de gitaro de S-ro B. Zapater.

La granda salono de «Enciklopedia Popola Ateneo» estis plena de distingindaj samideanoj kaj belegaj samideaninoj, ĝojaj pro tiu agrabla rendezuo en kiu faris sian reaperon inter ni kelkaj malnovaj esperantistoj el Barcelono.

S-ro Gili Norta entuziasmigis la atentan aŭskultantaron per la rakonto de tiom da emociaĵoj de li travivitaj dum longa restado en Esperantujo. La denova firma antaŭeniro de nia movado sendube impresas ĉiujn kiuj iam laboris por ĝi kaj espereble multaj el niaj samideanoj revekiĝos por la bono de nia sankta afero.

Nia tre estimata samideano S-ro B. Zapater, blindulo, veninta el la urbo de la XIII^a viziti sian familion kaj baldaŭ forveturonta Germanujon kie nun li loĝas, majstre ludis per la gitaro variaĵojn sur temo de Mozart, valson kaj fantazion, kaj poste ludis kaj kantis kelkajn germanajn kantojn esperantigitajn de li mem, kies teksto estis presata sur la disdonitaj invitiloj.

Monkolekto farita je la fino de la koncerto havigis la sumon da 82 pesetoj por la eldono de la revuo «Esperanta Ligilo» por blinduloj, kiu ĉiumonate alportas al ili lumradion en la nokto de ilia ekzistado.

Ni danke akceptos tiucele monhelpon de aliaj bonvolemluloj. Al la alvoko farita al la esperantaj organizaĵoj respondos tiamaniere, laŭ siaj fortoj, nia kara «Kataluna Esperantista Federacio».



Niaj Lingvaj Institucioj

Di ricevis Raporton de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio, kiun ni ŝatus represi se ni havus por tio sufiĉan lokon.

Estas en ĝi resumata la historio de niaj Lingvaj Institucioj depost Julio 1914. En Julio 1920 oni komencis ilian reorganizon kaj oni esperas plene atingi tion post nelonge.

La agado de la Lingva Akademio estas tute laŭdinda. Estas nepre necese ke oni defendu la lingvon kontraŭ la reformemo de malsaĝuloj.

Ni kopias ĉi-sube la lastan paragrafon de la raporto de S-ro Cart, kiu tiel elokvente montras la neceson de la lingva unueco.

Permesu, karaĵ samideanoj, ke, finante tiun ĉi jam tro longan raporton, — kiu montras, ke, se ni ne tiel multe laboris, kiel mi esperis: rapide fluas la monatoj! ni tamen ne estis maldiligentaj, — mi rediru kun insisteco, ke nia interna unueco estas la ĉefa kondiĉo de nia sukceso. Se tiel energie, tiel obstine ni defendas la pure Zamenhofan lingvon, tio ne estas, ĉar ni opinias ĝin en ĉiuj detaloj la plej bona: ne fanatikeco estas nia fideleco, sed ĉar ni scias, ke nur per tia sintenado ni povas konservi la unuecon ĉu internacian, ĉu interklasan, ĉu interaĝan. El lingva vidpunkto ne ekzistas, ne devas ekzisti inter ni diversnacianoj, diversklasaj homoj, diverssaĝuloj: ni ĉiuj estas Esperantistoj, nur Esperantistoj. Ni neniam starigu nacion kontraŭ nacio, klason kontraŭ klaso, aĝon kontraŭ aĝo, sed unuanime, manon en mano, ni laboru por la venko de la kara lingvo, kiun donis al ni nia neforgesebla Majstro, D-ro Zamenhof!



Bibliografio

Al la Esperantistoj!—Propaganda folio kun difino de Vegetarismo eldonita de I. U. E. V.

Unua Helpo.—Bele prezentita broŝureto per kiu la firmo Burroughs Wellcome & Co. — Londono (Anglujo) per bona esperanto propagandas siajn farmaciajn specialaĵojn, precipe la ekipojn por unua helpo en okazo de akcidentoj.

«*Mondjunularo Katolika*» (Moka). Alvoko al ĉiuj katolikaj gejunuloj, kun provizora statuto, aliĝilo, regulaĵo por la «Moka»-delegitoj kaj listo de ili en kelkaj landoj. Sidejo de Moka : Graz (Aŭstrujo), Karmeliterplatz, 5.


Faka Vortareto No. 2.—Terminoj uzataj en la komerco pri peltoj. = Eldonaĵo de Brita Literatura kaj Debata Societo. = Post la n^o 1, jen la n^o 2 de tiuj laŭdindaj fakvortaroj kiuj tiel efike faciligas la de ĉiuj esperantistoj deziratan aperon de plena, universala vortaro de la lingvo. Esperinde estas ke fakoj de bot - kaj ŝuindustrio baldaŭ aperu, laŭ anonco de la eldonintoj.

Tarptantines kalbos Esperanto vadovélis (Lernolibro de Esperanto por litovoj). — Aŭtoro A. Klimas.

Neeble estas al mi juĝi pri la didaktika valoro de tiu malgranda gramatiko ĉar mi tute ne konas litovan lingvon. Mi nur povis konstati ke la esperantaj tekstoj estis zorge elektitaj el verkoj de niaj klasikuloj, ĉefe el tiuj de la Majstro. El tio mi konjektas ke la verko estas bona kaj, esperinde, ĝi estos taŭga varbilo por litovoj.

Legolibro, unua volumo : *Internacia anekdotaro.*—Aŭtoro P. William.— Ĝi estas la n^o 7 de Nova Esperanto-Biblioteko, prezentita de Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin. Modela stilo, zorgema kompostado, interesa teksto : jen estas la valoraj kvalitoj de tiu anekdotaro kiu povas efike utili dum ekzercaj interparoladoj.

Bes-a Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj — Tria eldono, somero 1921, eldonita de Bohema Esperanto-Servo, Moravany (Ĉeĥoslovakujo). — Tiu nova eldono de la ĉie konata adresaro prezentiĝas pli valora ol la du antaŭaj. Tamen mi kun bedaŭro rimarkas ke la nombro da adresoj, ĉu de unuopuloj ĉu de esperantaj entreprenoj ne respondas al la graveco de nia movado en ĉiuj landoj. Dezirinde estas ke la venontaj eldonoj de tiu rekomendinda informilo estu pli enhavaj. Tion devas klopodi ĉiulandaj esperantistoj. Siavice, Bohema Esperanto-Servo agos bone se ĝi-revizos kun atenta zorgemeco la adresojn. Hazarde mi legas (paĝ. 68) ke S-ro D. Maynar loĝas en Zaragoza, Portugalujo (anstataŭ Hispanujo). — KATONO.




NIA VENONTA NUMERO

dediĉata al la Kongreso kaj Floraj Ludoj, kun detalaj raportoj kaj

SUPLEMENTO KUN BILDOJ

estos 32 paĝa (dumonata) kaj aperos nur je la fino de Novembro.



Nova Grupo en Salt



ROKSIME de Girona, en la vilaĝo Salt, fondiĝis nova grupo «Regeneracio» ĉe la Laborista Kultura Societo «Floreale» kaj estas komencita kurso de Esperanto, amase kaj fervore ĉeestata.

La 18^{an} de Septembro, je la 10^a vespere, okazis la solena inaŭguro de la Grupo per propaganda mitingo. Okupis la scenejon la parolantoj akompanataj de kelkaj samideanoj el Salt kaj Girona, kaj plenigis la tutan teatron publiko avida konatiĝi intime kun nia idealo.

S-ro Conrad Domènech, el Girona, kies laboremo vekis la esperantan fervoron en Salt, prezentis la parolantojn dirante ke ili plene elmontras kion li ekdiris en siaj antaŭaj paroladoj pri Esperantismo, kaj ĝoje konstatas la sukceson atingitan de ili, ĉar post nur kelke da semajnoj estas jam fakto la aranĝo de kursoj kaj la fondiĝo de la Grupo.

S-ro Delfi Dalmau, el Barcelona, konata intelektulo kaj malnova pioniro, faris belan kaj mildan paroladon pri la perfekteco de Esperanto kaj ĝia plena taŭgeco kiel lingvo internacia; S-ro Jaume Grau, Redaktoro de *Kataluna Esperantisto*, paroladis pri la profito kiun speciale la laboristoj povas eltiri el Esperanto, faciligante per ĝi la rektan interrilaton de la internacia laboristaro kaj pligrandigante sian kulturon kaj ĉiuspeciajn kapablojn; kaj S-ro Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», rakontis la impresojn de sia vojaĝo tra Eŭropo okaze de la Praha Kongreso, pruvante per emociaj vortoj la fratecon de nia samideanaro kaj la certecon de nia fina venko, kaj rekomendis ke ĉiu laboru nun plej intense per tiu agema kaj senlaca entuziasmo jam montrita de la nova aro da kunbatalantoj. Li finis sian varman paroladon per invito al la IX^a Kataluna Kongreso.

Per kora aplaŭdo la tuta ĉeestantaro esprimis sian fidon je nia ideo, post la fino de ĉiu parolado.

La Prezidanto de la Grupo resume parolis fine, dankante ĉies helpon, kaj kronis la belan feston vigla kantado de nia esperanta himno.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto	Nova Tempo
Le Monde Espérantiste	Literaturo
Esperanto-Praktiko	Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)
Itala Esperantisto	The British Esperantist
La Marto	Nederlanda Esperanto
La Semisto	La Verda Ombro
Germana Esperantisto	Amerika Esperantisto
Hispana Esperantisto	Libero
Internacia Komerca Revuo	L'Esperanto
Esperantista Laboristo	La Revuo Orienta
Kristana Espero	El Esperanto
Verda Utopio	Brazila Esperantisto
Vegetarano	Oficiala Gazeto Esperantista
Espero Katolika	Ĉeĥoslovaka Movado
La Esperantisto	Nova Eŭropo
La Laborista Esperantisto	La XIII ^a
Esperanto	Agitanto
Hungara Esperantisto	Bizantio
Esperanto Triumfonta	

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Berthold Heinrich - Steinstr. 46 p̄tr. Breslau, 23, (Germanujo), p. k. kaj interŝanĝi gazetojn kaj papermonon.

S-ro Kurt Höfer, Topfmarkt 11, Plauen c. Vogtl (Germanujo), p. k. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.



POR PRUVI LA NUNAN FORTON DE ESPERANTO EN NIA
LANDO, VETURU AL GIRONA!

POR LA PLENA REVIGLIGO DE "KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO", PARTOPRENU LA IX^{AN} KATALUNAN
KONGRESO!

